

& Pa..sportaĵoj:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj. Klarigo (*): '6 Kelkajn insulojn en Pacifika Maro Francujo inkluzivas en sian ĉefteritorion, kvazaŭ ne koloniojn.>

(#Melodio:

<:47> (i;So /So do doSo FaMi So;So dodo miimimi mire doTi So

(#Rekantaĵe1: o;La SoFa MiRe Mi Fa MiRe Mi)

i;So /SoSo dodo doSo FaMi So; do miimimi mire doTi do;

(#Rekantaĵe2: o;La SoFa MiRe Mi Fa MiRe Mi i;La SoFa MiRe Mi i;La SoFa MiRe Mi Fa MiRe Mi)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 Oh /ho! por iri al kongres', ; Jes, Mi konfesas: Necesas La permes'

(×:; **Rakontas mi al vi, samidean'**.)

Ne nur de bopatrin' kaj famili' ; Sed ankaŭ de l' Ad-mi-ni-straci'!!

(×:; **Rakontas mi al vi, samidean' ; Kongresen kuras mi ; Rakontas mi al vi, samidean'**.)

'2 Frumatene kuras vi ; Al policsekretari' Kaj atendas laŭ la vic' ; Ĉe l' kvartalpolic',

'3 Kiam posttagmeze vi ; Fine staras antaŭ li, Li nur diras: "Por kongres'?? ; Vidu ĉambron 6!"

'4 Antaŭ tiu ĉambro 6 ; Vi atendas sen sukces', Ĉar finiĝis ĵus deĵor' ; Pro malfrua hor'!

'5 Vi dum la sekvanta tag' ; ree kuras al atak' Kaj post atendad' sen fin' ; Iu vokas vin.

'6 Tiu iu diras tuj: ; "Ĉar vi estas en Francuj', Pruvu, ke ne estas vi ; En Oceani'*!

'7 Kaj necesas nun atest' ; Pri funkcio de l' digest' Kune kun deklaraci' ; Pri l' reputaci'!

'8 Kun atestoj en bonord' ; Vi restaras ĉe la pord' Kaj transdonas ĉiujn ĉi ; Al sekretari'

'9 Grumblas li post ekzamen' De l' unua specimen': "Kial ne subskribis ĝin ; Via pordistin'??

'10 Kaj vi kuras nun sen halt' ; Kiel hundo sur l' asfalt', De l' kvartala policej' ; Al la prefektej',

'11 Kaj kun urĝa dokument' ; Vi rapidas kiel vent' Kaj vi saltas tra la strat' ; Kiel akrobat'!

'12 Poste vi kun ĝoja ŝajn' ; Dum dek tagoj de l' semajn' Sidas ĝis noktmeza hor' ; Ĉe l' ambasador',

'13 Kaj vi pagos por la ŝtat' ; Tricent frankojn (kun rabat!), Fine estas en bonord' ; Via la pasport'!

'14 Oh ho! por iri al kongres', ; Jes, Mi konfesas: Necesas La permes' Ne nur de bopatrin' kaj famili' ; Sed ankaŭ de l' Ad-mi-ni-straci'!!